

La Letero



2019 - 04

Alĝu rapide !
Nur 15€
por la tuta tago,
inkluzive manĝon

**Dimanĉon
la 28-an de
aprilo 2019
en Anĝevo**

Salono Paul-Bert
Vojo Edgar Quintet


**Tago pri
Humuro kaj
Esperanto**



HUMURO ESPERANTO

Kompletaj informoj en nia retejo :
<http://www.esperanto-angers.fr>

*Venu distri vin
kaj ridi kun ni !*



**En nia biblioteko,
sciencfikcia romano malkovrinda :
«TERRA» far István Nemere - hungara verkisto**

Yarkos fabelas. Li, vaganto de galaksioj, migrulo de la spacovojoj, rakontas al la loĝantoj de la sistemo Metastella pri la perdita edeno, pri la prahejmo de la homaro : pri Terra. La veron li maskas fabele, ja alie li ne rajtus ĝin eldiri. Kaj la publiko kredas la televidan fabelon.

Terra apartenas al tiu ĝojige plimultiĝanta aro da romanoj, el kiuj pli kaj pli ofte elaperas verkoj valoraj, signifaj kaj aŭtente esperantaj..

(Laŭ recenzo el *Literatura Foiro*)

La libroj de nia biblioteko estas konsulteblaj kaj prunteblaj de la membroj de Esperanto-Angers. Kontakto : biblioteko@esperanto-angers.fr

Ĉiam plezurigas poŝtkarto

Esperanta Poŝtkruciĝo estas interŝanĝoservo de poŝtkartoj kun esperantistoj el diversaj landoj, regionoj, urboj kaj vilaĝoj. Ĉu ne estas bona ideo sendadi belajn bildkartojn al la esperantistoj, hazarde elektitaj de la aŭtomata sistemo ?

Ĉu ne estas agrable trovi en sia enireja poŝtkesto surkartajn salutojn en Esperanto de nekonataj (aŭ konataj!) samlingvanoj ? Jes ja, tio eblas !

Iru al la paĝaro : <https://bildkarto.wixsite.com/bildkarto> kaj plenigu tre simplan aliĝilon. Vi tuj ricevos elektronikpoŝte ies adreson !

Elektu en papervendejo bildkarton, surskribu ĝin kaj sendu el la poŝtejo.

Kaj atendu surprizojn en via poŝtkesto !

Ĝuu belecon de la bildkartoj kaj amikemon de esperantistoj el la tuta mondo !

Ĝis la bildkarto !



La Anĝevanoj estas dorlotataj !

Post "Angers Loire Valley" antaŭ kelkaj jaroj, kaj post la "Station Helper" freŝdate proponataj al la uzantoj de la stacidomo, jen nun "Angers IceParc" : tio estas la nomo de la nova glaciĝitejo venontseptembre inaŭgurota. Kial refoje elekti anglan vorton ?

Ĉu la franca lingvo estas tiom netaŭga, malriĉa, ke ne eblas trovi esprimon aŭ francan nomon ? Aŭ ĉu nun tro eksmodas uzi la francan ? Kio pri la tiel nomata "leĝo Toubon", kiu celis protekti la francan lingvon ? Almenaŭ unu certa afero : ne plu uzi lingvon estas unua paŝo al ĝia flankenpuŝo kaj, iam, mortestonto.



Panelo en la stacidomo de Angers

Bonvolu ne forgesi sendi vian kotizon 2019 al Esperanto-Angers



Programo printempo/somero de Greziljono

Kulturdomo de Esperanto

12 - 16 aprilo 2019

Ĥora (korusa) renkonto de Interkant' kun Zdravka Bojĉeva

12 - 16 aprilo 2019

LandArt, Arto kaj Naturo en Greziljono kun Nathalie Dubrulle

26 avril - 4 majo 2019

9-a PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Przemek Wierzbowski, Christophe Chazarein, Marion Quenut

3 - 4 majo 2019

9-a PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj

28 aprilo - 4 majo 2019

2-a Migra-promenada semajno (en Esperanto) kun Olivier Buisson

8 - 18 julio 2019

3-a Maratona Esperanto-kurso dum 10 tagoj kun Dennis Keefe,

8 - 18 majo 2019

5-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)

6 - 16 aŭgusto 2019

9-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj

6 - 16 aŭgusto 2019

2-a Internacia danco-semajno kaj Esperanto-kursoj

26 oktobro - 3 novembro 2019

8-a AŬTUNE la Esperanto-ferioj - kun halovena festo

La tuta agendo estas je : gresillon.org/agenda

Maison Culturelle de l'Espéranto

Château de Grésillon

St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ-EN-ANJOU

02.41.89.10.34

Espéranto-Angers

3 allée du Haras, Appt 132, 49100 Angers, France

Tél. +33 (0)2 41 20 19 40 - <http://www.esperanto-angers.fr> - info@esperanto-angers.fr